Prezo 7€

Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org
Novembro-Decembro 2013, n-ro 11-12 (1301-1302)

# Sennaciulo

## Virinaj vivkondiĉoj



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Redaktangulo

**Karaj legantoj,**

Jen la lasta numero de la 2013-a jarkolekto, ĉi-foje kun dosiero pri virinaj vivkondiĉoj, traktitaj el diversaj perspektivoj: ĝeneral-politika, kun diversaj opinioj pri la gravo kaj rolo de la viro/virina divido en la nuna socio; arta, kun historia kaj soci-kultura perspektivo pri la loko de virinoj diversepoke; sociologia, kun precizaj informoj pri virinaj vivkondiĉoj en iu mondoparto. Esperinde estas, ke ĉi tiu lasta parto instigos legantojn el aliaj mondopartoj verki similajn tekstojn por alia samtipa dosiero post eble jaro, ĉar ja konkretaj kaj precizaj informoj aparte bonvenas por ebligi detalajn komparojn.

Duafoje aperas la nova rubriko pri LEA-ana elan', ĉifoje interalie kun informo, ke la jar-kunveno de SAT-Amikaro okazos en Dinano tuj antaŭ la SAT-Kongreso. Jen bona oportuno por nefranclingvaj kamaradoj interesiĝantaj pri LEA-rilata laboro konatiĝi kun la funkci-maniero de SAT-Amikaro! Ankaŭ reliefiginda estas la atentigo, ke daŭre atendataj estas volontuloj por pritrakti la gvidrezolucian punkton pri starigo de anglalingva inform-retejo.

Momente paŭzas niaj teatremuloj, sed anst-ataŭe povos vi ĉi-foje legi pri kino, inter aliaj diverstemaj kontribuoj.

Se ne jam farite, pensu plenigi la aliĝilon ric-evitan pasint-numere por enskribiĝi al la SAT-Kongreso en Dinano. Jam 57 partopren-antoj registriĝis ĝis la 31-a de Decembro 2013. Se vi hezitas pro financaj kialoj, mem-oru ke ekzistas aparta kongresa help-fond-uso, kaj ne hezitu kontakti la PK-on tiurilate. Kaj se vi ne estos disponebla dum la kongresa semajno, aŭ ne plu povas elteni longajn voj-aĝojn, eblas ankaŭ skribe partopreni. Ĉi-num-ere aperas enkonduko al la kongresa temo, kiu celas instigi al verkado pri la dosier-temo por la majo-junia numero.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi.

*la RoKo (Redaktoskipa Kunordigotrio).*

**Memorigo pri venontaj dosiertemoj**

- Usona imperio. Kunordiganto *Kani* - 12-a de Januaro 2014
- Latinameriko. Kunordiganto *Brandon* Sowers - 12-a de Marto 2014
- Kongresa Temo: Civitanoj loke konstruas ontecon. Kunordiganto *Guy Martin* - 12-a de Majo 2014 *Vidu ankaŭ la enkondukon en p. 33*
- Konspiroj kaj konspirteorioj. Kunordiganto *Djemil Kessous* - 12-a de Julio 2014

*Pliaj proponoj bonvenaj por la agad-jaro 2014-2015!*





# Enhavo


**Redaktangulo** **2**

**Temdosiero Virinaj vivkondiĉoj** **4**

La "liberigo" de la virinoj 4

Virinoj kaj revolucio 5

La virino kaj la Poezio en *Al-Andalus* 10

Virinoj kaj viroj fronte al la krizo 17

Interhelpo 17

La statuso de romaaj virinoj en Serbio 17

Virinecaj pentristinoj Ĉefe rilate al *Berthe Morisot* 19

Niaj tri paŝoj 20

Kiel vivas la virinoj en Serbujo? 20

**Tra Esperantio** **22**

Esperanto en Olimpikoj 22

Invito al PRINTEMPaS 22

**El la kampoj** **23**

Migrado kaj agrikulturo 23

Rajtoj de agrikulturistoj kaj agrikulturlaboristoj 26

Voĉoj el la kampo 26

**Socio** **28**

Politik-socidanco 28

Maljunuloj batalas kontraŭ elektra kompanio en *Miryang*, Koreio 29

**Intelekta Memdefendo** **30**

LEA-ana elan' n°2 31

**El la leterkesto** **32**

Vegano, plu kaj fin' 32

**El la SAT-administrejo** **32**

"Civitanoj loke konstruas ontecon" 33

Kongrestema Dosiero en Sennaciulo 34

Listo de aliĝintoj al la Dinana Kongreso 35

Kotizo 36



**Praktikaj informoj**

Sennaciulo estas oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de SAT: 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: + 33.9.50.71.01.97
Retadreso: satesperanto@free.fr
Retejo: http://satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

**Plenum-Komitato de SAT**

Prezidanto: Vinko Markovo
Sekretario: Tereza Sabatier
Kasistino: Franjo Lévêque
Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent, Brandon Sowers

**Sennaciulo**

Ĉefredaktantoj: Andreo Hoaro, Robin' Beto, Vinko Markovo
Enpaĝiganto: Ŝtonĉjo
Ceteraj redaktantoj: Nikolao Gudskov, Jomo Ipfelkofer, Djémil Kessous, Petro Levi, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale

**Kontribuojn sendu elektronike al:** sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paper-poŝte al SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Ĉiujn demandojn pri financaj aferoj sendu al: leveque.franjo@gmail.com

Libromendojn sendu al: libroservo@sat-amikaro.org

Librajn eldonproponojn sendu al: pimskrabo@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel.

Le directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono: France 57 €
Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépot légal à la date de parution: N°CPPAP 0515 G 86567